




Kapelo en la vilaĝo Kauns, en Aŭstrio.



KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA
KAJ KULTURA REVUO

NUMERO 3 (217)
JULIO-SEPTEMBRO 2008
VOLUMO 42

2008 3

Editeur : MCE, Grésillon, 49150 Baugé, France.
Directeur de publication : Dominik Bertrand.
Imprimeur : D. Bertrand, MCE, Grésillon, 49150 Baugé.
Dépôt légal septembre 2008. ISSN 1272-5188. 2 €.

Abonu la Kulturajn Kajerojn por 2008

1^a paŝo :

Informu pri la poŝta adreso, kien ni sendu la revuon, al
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr »

aŭ al peranto.

2^a paŝo :

Pagu 10 eŭrojn, precizigante por kiu vi pagas, al
« Maison culturelle de l'Espéranto »
dum via venonta vizito al Greziljono aŭ al peranto.

Atentu :

Komence de jaro ni ne plu sendos la revuon al tiu, kiu ne pagis
sian ĵus pasintan jaron.

Perantoj

Ni serĉas novajn perantojn en ĉiuj landoj.
Helpu nin !

Unua kovrilpaĝo :

Lilli Giloteaux proponis tiun bildon kiel projekton por nova
kovrilpaĝo en 1968 ! Sed tiam teknikaj kaj kostaj problemoj ĉe la
presisto malpermesis ŝanĝi la kovrilon de la *Kulturaj Kajeroj*.
La vizitintoj de la kastelo Greziljono certe rekonas detalon de ties
fama kameno.

Kulturaj Kajeroj JARO 2008, NUMERO 3

HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

Sub la granda kverko de Greziljono p. 34

Greziljono 1968 ; Solidareco kun Prago en 1968 ;

Ŝercoj dum staĝoj en 1968.

En kongresejo : *La Roterdama Universala Kongreso* p. 44

KLERIGADO

Beletro : *Eniri en poezion* p. 46

Psikologio : *Gestalt-psikoterapio* p. 49

Lingviko : *Kiel nomiĝu Grésillon ?* p. 53

DISTRIGADO

Rakonto : *La Du Feinoj de Grésillon* p. 58

Poezio : *Hajkoj* p. 60

Unua eldono laŭleĝe deponita en Francio en septembro 2008. ISSN 1272-5188

Verkintaro :

Andreo Andrio, Dominik Bertrand, Francisca Calegari, Jean-Yves Grillé, Jean-Luc Kristos,
Véronique Lemoine, Klod Martins, Bernard Michaux, Rolande Nedellec, Emilio Perez Gimeno,
Christian Rivière, Sylvie Ternant, Pablo Tomás Conesa, Juanita Turbillon.

Korektinto : Christian Rivière.

Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

Greziljono 1968

Kio okazas ĉi jaron
en la kastelo Greziljono ?



Foto 1. – La 24^{an} de julio Tibor Sekelj (ĉe la tablo) gvidas la diskutadojn ĉirkaŭ la ĉi-taga temo : « la agado sur kampo praktika ».

Inter la 4^a kaj la 11^a de aprilo

Okazas la sesa « kultura semajno », organizita de la Franca Esperanto-Instituto (kaj Unuiĝo franca por Esperanto), apogita de la franca nacia edukado, ĉar la staĝanoj estas ontaj instruistoj. Partoprenas entute sesdek homoj, inter kiuj tridek junuloj. Programo : kursoj, pedagogio, kulturo, prelegoj, ekskursoj.

En majo 1968

Aperas broŝuro, kromkajero por la *Kulturaj Kajeroj* : *Naskiĝo de Esperanto-domo*. Tio estas omaĝo al Henri Micard, kiu mortis antaŭ du jaroj. Ĝi priskribas la unuajn dek ses jarojn de la kulturdomo, uzante dokumentojn lasitajn de ties fondinto. La kovrilo estas desegno de Lilli Giloteaux.



Foto 2. – La 31^{an} de julio (maldekstre : gesinjoroj Bourdelon).

Inter la 1^a kaj la 21^a de julio

Okazas la « Esperantistaj Studoj », sen grandega alfluo. Programo : kursoj (A. Ribot, J. Vincent), diversaj aktivajoj, ekskursoj...

Inter la 21^a de julio kaj la 4^a de aŭgusto

Okazas « seminario de UEA », antaŭ la universala kongreso en Madrido. La ĝenerala temo pritraktata estas : « Modernaj formoj de




Foto 3. –
Klasĉambro situas
en manĝoĉambro.



Foto 4. –
Klasĉambro situas
en la biblioteko.



Foto 5. – La 20^{an} de
aŭgusto 1968.

laboro en la nuntempa Esperanto-movado». Dum la tutaj tagoj estas libera tribuno, kun prelegoj, diskutoj, diskutadoj...

Partoprenas eminentuloj : I. Lapenna, J. Thierry, T. Sekelj (foto 1), G. Becker, Bormann... Oni rimarkas la preskaŭ tro altan nivelon de la prelegoj.


La 1^{an} de aŭgusto, multaj seminarianoj foriras al Madrido. Por la restantaro daŭras prelegoj, diskutadoj, ekskursoj...

Inter la 4^a kaj la 25^a de aŭgusto

Okazas la « esperantistaj kulturaj semajnoj », kun granda sukceso. Partoprenas pli ol cent personoj. Oni rimarkas, ke tiu periodo estas ankoraŭ pli internacia ol kutime.

Programo : kursoj (tri niveloj gviditaj de J. Turbillon, M.-A. Gerrier-Tomialoje, P. Babin); preparo al pedagogia atesto (J. Thierry); tradiciaj aktivaĵoj : bindado (G. Dairon) kaj korbofarado (M. Dairon); nova aktivaĵo : fotoarto (M.-A. Gerrier); debatoj; filmoj; ekskursoj; ekzamenoj (Thierry, Bourdelon).

Foto 6. – Aŭguston 1968.



Inter la 25^a de aŭgusto kaj la 4^a de septembro

Okazas periodo kun ripoza restado por kelkaj, kaj kursoj (A. Ribot) por aliaj. Granda neatendita sukceso por tiu periodo.



Foto 7. – Bindado.




Foto 8. – Bindado.

Dum la tuta somero

Partoprenas ĉirkaŭ kvarcent vizitantoj, el dudek unu landoj. Sukcese trapasas ekzamenon kaj ricevas : la «ateston pri lernado» dek unu lernantoj (inter kiuj Klod Martins, p. 42); la «ateston pri supera lernado» kvin lernantoj; la «ateston pri kapableco» du lernantoj.

Oni rimarkas, ke pli kaj pli da junuloj interesiĝas pri la lingvo.

Konstruado

Dum la jaro 1967 okazis gravaj laboroj : konstruo de la ekstera sekur-elirejo el la etaĝoj (super la verando); kaj ĉefe ĝisfunda purigado de la lageto. Tiom kostis ili, ke ne plu eblas gravaj laboroj ĉi jaron. Oni nur renovigas kelkajn ĉambrojn, koridoron, kaj aliajn aferetojn.

Oni decidas konstrui minigolfon, laŭ planoj de sinjoro Cîret. Ĝi situos sude de la tenisejo, kaj funkcios dum kelkaj jaroj.



Foto 9. – Dum korbifarado, kun sinjorinoj Benazet, Lenel, Tulasne. Ĉu laboro aŭ babilado ?



Foto 10. – La korbifaradon gvidas sinjorino Dairon (meze, malantaŭe).

Solidareco kun Prago en 1968

Verkis
Juanita Turbillon.

SERĈANTE en mian fotalbumon, mi trovis tiujn fotojn. Kiam mi vidis ilin, tuj revenis al mia memoro la teruraj tagoj de aŭgusto, dum kiuj la rusaj tankoj invadis Pragon. La junulino, tuj sub la ŝildo de



Foto 11. – Tomiko Ikeda, Jirina kaj Juanita ĉe la enirejo de la kulturdomo en aŭgusto 1968.

Grésillon (foto 11), nomiĝas Jirina. Ŝi loĝis en Prago, kaj ofte diris al ni (ĉar ŝi mem ne komprenis la francan lingvon) :

« Aŭskultu la radion, diru al mi kio okazas. »

Ni provis ne konsoli sed kvietigi ŝin, ankaŭ la tre bonkora Tomiko Ikeda, el Japanio. Mi poste renkontis Tomiko-n en la universala kongreso de Prago en 1996, kaj mi daŭre korespondas kun ŝi.

Vidu kiel, pere de Esperanto, ni travivis pli proksime mondan eventon.

Mi ne plu revidis Jirina-n poste en renkontoj.

Eble, ŝi forlasis Esperanton. Mi esperas, ke nenio malagrabla okazis al ŝi.



Foto 12. – Tomiko Ikeda, Jirina kaj Simone.



Foto 13. – Ĉe Juanita, antaŭ Tomiko Ikeda, Jirina muelas verdan japanan teon per speciala ilo.

En la foto 5, p. 36, Jirina aperas meze, malantaŭe.

Ŝercoj dum staĝoj en julio 1968

Verkis
Klod Martins.

EN LA apartamento kolektiva de la kastelo Greziljono, mi kuŝas en lito. Malfrue alvenas dek-kvar-jara Jean-François Bourdeau, kiu simpatias min. Mi proponas fari ŝercon al la junulinoj.

La morgaŭon mi aĉetas kandelojn kaj alumetojn, kaj vespere kun pliaj kompliĉoj ni vestiĝas per blankaj littukoj.


La kvaropo eniras en la ĉambron de iu junulino dumnokte. Sen lumigi la ĉambron ni staras ĉe la kvar anguloj de la lito. Mallaŭte, sekve pli kaj pli laŭte, ni kantas la konatan kantikon pri mortintoj *De profundis*!

La junulino fine vekigās, kaj, en la mallumo de la ĉambro, vidas la kvar fantomojn kun kandeloj brulantaj. Opiniante, ke oni kredis ŝin morta, ŝi ekkrias tiel terure, ke la tuta kastelo estas vekita!

Tiam la ŝercemuloj paradas tra la koridoroj kantante *De profundis*.

(Ne forgesu, ke estas malpermesite promeni kun fajro tra la kastelo, pro risko de fajrego.)

Alifoje, ni baniĝas en la lageto, kaj sekve trairas nude kun malseka bankalsoneto la grandan salonon, kie daŭre babilas eminentaj esperantistoj (kiel en foto 1, p. 34)!



Fine de la staĝo, mi sukcese trapasas la ekzamenon por « atesto pri lernado ».

En 1969, mi pliafoje lernas Esperanton por perfektigi, kaj sukcese trapasas la ekzamenon por « atesto pri supera lernado ». Mi restadas en la kastelo kun miaj gefiloj, kvinjara Olivier kaj trijara Virginie, kaj kun mia edzino (sekve divorconta), kiu preferas klaĉi franclingve kun oldulinoj.




Foto 15. – Ripozado antaŭ la lageto en 1968.

La Roterdama Universala Kongreso

Verkis
Juanita Turbillon.

KIEL la bicikloj sur la larĝaj ebenaj rezervitaj padoj, la kongreso glate ruliĝis dum la semajno. Tre malmultaj ŝanĝoj en la horoj kaj lokoj, prelegoj preskaŭ ĉiam akurataj. La kongresejo estis sufiĉe granda, kaj ĉio okazis en ĝi. Estis impona konstruaĵo kun larĝa ŝtuparo, rulŝtuparo por eniri, ne por eliri. Tion mi ankaŭ aliloke konstatis.

La vetero dum la unuaj tagoj estis pluvema. Mi skribis multajn poŝtkartojn plendante pri la pluvo, sed, kiam la poŝtkartoj foriris, la bela vetero revenis! Dankon!

Kiel ĉiam, la inaŭguro estis solena, la festparolado de H. Tonkin trafe argumentita, la parado de la naciaj delegitoj longa: sepdek tri nacioj reprezentitaj, entute mil okcent kvardek kvin partoprenantoj.

Estas agrable retrovi la amikojn kaj la samajn kongresajn erojn de kongreso al kongreso. La renkonto kun la estraro kviete disvolviĝis, ankaŭ la renkonto de la komitatanoj. Laŭ mi, estas bona signo pri kontentiga funkciado.

Mi sekvis du prelegojn de IKU*, la plej facilajn! ankaŭ kelkajn pri la lando, por prepari la kvintagan postkongresan ekskurson al la



norda lando. Unuafoje mi havis okazon viziti la centran oficejon de UEA, en bela konstruaĵo tre taŭge aranĝita sur pluraj niveloj.

La rendevua tabulo korekte funkciis.

Laŭ mi, diverseco iom mankis dum la vesperoj. Multaj muzikaĵoj kaj kantoj de bonega nivelo, sed, ĉefe por la nacia vespero, mi atendis pli. La internacia vespero estis brila, tre agrabla. Alia tre interesa ero de la kongreso estis la prelego pri Van Vogh. Ĝi estis elstara, sekvata en religia silento. Mi sentis miajn amikojn tiel emociitaj kiel mi. Kiel bona estas tiu komunikiĝo!

La tuttaga ekskurso, bone organizita, kulture riĉa plaĉis al mi. Ni plurfoje ŝipis sur kanaloj, sur lagoj, perfekta maniero ĝui la pejzaĝojn. La grandega digo (30 km) impresis min. Oni povas kompari tiun ĉefverkon al la tunelo sub la Manika maro. En la mezo de la digo estas monumento al la konstruistoj. Dum tiuj kvin tagoj, ni vizitis muzeojn, vilaĝojn. La ritmo ne estis tro rapida, ni havis ĉiam sufiĉe da tempo por admiri.

Resume mi diras:

Nederlando = kanaloj, ŝipoj, boatoj, ŝafoj, nigreblankaj bovinoj, biciklantoj, ventmuelejoj, ventmotoroj, bonega kongreso.

* IKU estas la internacia kongresa universitato. Antaŭ 1981 ĝi nomiĝis ISU, internacia somera universitato. Ĝi proponas fakajn prelegojn kun plej bona scienca nivelo. UEA publikigas la tekstojn de la prelegoj kaj libro-forme kaj Interrete por libera diskonigo. Ni tre konsilas ties legadon.

Eniri en poezion...

Verkis
Sylvie Ternant.



DUM mia lasta restado en Greziljono (de la 2^a ĝis la 9^a de aŭgusto 2008) mi, kun granda plezuro, partoprenis staĝon gvidata de Aurora Bute. Ŝi petis de la partoprenantoj, ke ili prezentu temon al la aliaj, laŭ elektita teksto. Tiu-cele, mi do « promenatis » en la librojn de la biblioteko en la kastelo. Tio gvidis min al *Esperanta Antologio, Poemoj, 1887-1957* de William Auld.

Unue mi pensis, ke mi elektos poemon en ĝi kun intenco debati ĉirkaŭ ĉefverko de Esperanta literaturo. Sed, dum legado de la enkonduko, kelkaj punktoj frapis min. Finfine la debato centriĝis koncerne alpaŝon al poezio.

En la enkonduko de ĉi tiu antologio, William Auld raportas pri evoluo de Esperanta literaturo. Samtempe, li aldonas analizon koncerne la valoron de diversaj poetoj, hierarkie. Tiu subdivido iom ĝenis min.

Laŭ mia opinio, la « bona » verkisto pli simple estas tiu, kiu estigas realan emocion. Kompreneble, konstruita poezio valoras, se ĝi nepre respondas al diversaj reguloj fonditaj laŭ versofarado, originaleco, ritmo, ktp. Tiel ĝi transdonas emocion. Mi ne kredas pri la ebleco

transdoni tiun emocion, kiam vera poezia laboro ne efektiviĝis. Tiam, poezio, kiu estigas emon aŭskulti, reciti, devige havas literaturan valoron...

Mi ankaŭ bedaŭras en tiu enkonduko de William Auld ne-tolereman tonon :

« Mi esperas, ke nun ni rigardos samideanon, kiu ne konas almenaŭ la ĉefajn poemojn en ĝi, kiel senhontan needukiton aŭ analfabeton. »

En la dua eldono de tiu antologio : *Esperanta Antologio, Poemoj, 1887-1981*, li reuzas la saman citaĵon.

Mi ankaŭ aprobas konstitucion de kultura heredaĵo, kondiĉe, tamen, ke ĝi ne iĝu reduktema. Kaj ĉi tie, laŭ mi, staras iu danĝereto.

Dum studo pri literatura lernado en elementa lernejo, mi havis la okazon observi lerneajn librojn ekde la 1870-aj jaroj. La versoj de Victor Hugo, en la franca lingvo :

O combien de marins, combien de capitaines !

aperas ĝis la aktuala generacio. La poemon : « *Demain dès l'aube...* » de la sama verkisto favoras antaŭaj kaj nuntempaj instruistoj, kelkfoje iom limigite. Tiuj poeziaĵoj de V. Hugo estas belegaj. Tion oni ne povas nei ! Tamen, mi ankaŭ malkovris valorajn poemojn, ekster antologioj, kaj nekonatajn. Eblis al mi rimarki, kiom ili plaĉis al infanoj kaj al iliaj gepatroj. Mi malkovris ilin promene hazarde tra legadoj, bibliotekoj, librejoj, aŭskultante lumdiskojn...



En la dua eldono *Esperanta Antologio, Poemoj, 1887-1981*, mi rimarkas poezion de iu anonima, kiu ne troviĝas en la antologio de 1887 ĝis 1957. Ĝi, do, aperas kiel hazarda malkovro.

Mi legas en la postparolado de la dua eldono :

« Al poetoj kiuj ne troviĝas inter la elektitaj 163, mi petas pardonon : eĉ tiel dika volumo finfine havas siajn limojn, kiel limojn havas ankaŭ la elektivo de ĉiu redaktoro. Al tiuj neglektitaj poetoj

mi deziras, ke ili verku diligente kaj meritu sian lokon en iu estonta tria eldono.»

Mi tute aprobas, kiam W. Auld mem substrekas la limojn de tiu-ĉi antologio; sed, pri «tiuj neglektitaj poetoj», ĉu necese atendi trian eldonon por malkovri ilin? Kial ne ekkonatiĝi kun ili pere de ne rigora, bohemia legado? Ni ne forgesu ankaŭ tion, kion oni lernas ekster akademaj normoj, per individua traserĉado.



Auld (William), *Esperanta Antologio, Poemoj, 1887-1957*, J. Régulo Pérez eld. (Stafeto), La Laguna, 1958, 648 p.

Auld (William), *Esperanta Antologio, Poemoj, 1887-1981*, UEA, Rotterdam, 1984, 888 p.

En la enkonduko de la unua eldono, W. Auld citas kaj aprobas R. Rossetti-n, kiu komparas antologion kun kolekto da floroj elektita en kampo kaj aranĝita laŭ propra personeco de la elektanto. W. Auld skribas, ke «ekzistas trafikaj argumentoj kontraŭ poemantologioj». Mi bedaŭras, ke li ne precizigas pri kiuj argumentoj temas.

Kompreneble, mi tute ne neas la grandan valoron de tiu poemkolektado de W. Auld. Eĉ mi vere, kiel multaj, salutas tiun laboregon. Mi nur bedaŭras la tonon direkteman de la enkonduko. Mi dezirus, ke oni donu lokon ankaŭ al spontanaj, hazardaj malkovroj, kadre de literaturo.


Ĉiu el ni povas krei propran bukedon konstituitan per la floroj de tiu antologio aŭ (kaj) eble aliaj floroj ekster ĝi.

Gestalt- psikoterapio

Verkis

Pablo Tomás Conesa.

ANTAŭ tri jaroj, post fino de mallonga sed tre intensa amrilato kun Kolombia knabino, mi decidis komenci terapion, kun la celo reordigi mian vivon kaj ĵeti lumon sur aferojn, pri kiuj mi suferis. Mi estis aŭdinta pri terapio nun ekzistanta kun nomo «gestalto», kaj, kvankam mi nur malprecize sciis pri ĝi, mi sentis, ke tiu estis la vojo, tra kiu mi volis promeni. Mi telefonis do al psikoterapia centro gestalta en Madrido (CIPARH), kiun konatino rekomendis al mi, kaj mi petis unuan rendevuon.



Mi iris por la unua fojo. En mezgranda ĉambro tre luma kaj kun etoso iom orienteca, kiun mi trovis agrabla, staris du foteloj rigardantaj unu la alian. Sur unu sidis mi, kaj sur la alia, rigardante min, sidis terapiisto. La afero ne temis do pri paciento sur divano kun terapiisto en ombro aŭskultanta kaj notanta kion la paciento diradas, kiel mi imagis vidinte filmojn de Woody Allen. Dum ĉi prova unua rendevuo mi klarigis al la psikoterapiisto la kialojn por ekterapii kun li.

Li decidis akcepti min kiel klienton, kaj mi lin kiel terapiiston. Lia nomo estas Javier.

Kunvenon post kunveno mi parolas pri miaj aferoj. Kiam mi devojiĝas, Javier rekondukas min al estanteco. Ĉar laŭ tio, kion mi vidis laŭlonge de ĉi tri jaroj, gestalt-psikoterapio ne temas pri konjektado nek pri interpretado, sed pri konekto kun la nuna momento. Ja jes, en gestalt-psikoterapio resaniĝo fontas el rekontaktiĝo kun estanteco, kun la konkreta kaj nuna realo, en kiu ni vivas. En psikanalizo, laŭ miaj malgrandaj scioj, resaniĝo venas de klarigo far psikanalizisto pri psika vundo okazinta en la pasinteco (ĉefe dum infanaĝo). Ĝi venas do de lumigo de pasinteco, ja ne de kontakto kun estanteco.

Por helpi min atingi tiun sanigan estantiĝon, Javier pligravigas, ke mi ekkonsciu kaj esprimu miajn sentojn anstataŭ babili; pligravigas, ke mi parolu pri vere okazintaj faktoj anstataŭ pri fantazioj; atentigas min pri tio, kion mia korpo esprimas; invitas, ke mi rekte esprimu min per pronomo «mi» anstataŭ per nerekta kaj fuĝa pronomo «oni», ktp.

Tiamaniere renkonton post renkonto, dank' al tiu kunlaborado inter mi kaj li, mi pli konscias pri mia nuna situacio, kaj tiel problemoj, kiuj suferigas min, komencas poiome solviĝi.

Mi vidas, ke alia centra vorto en gestalto, krom konscio, estas respondeco: vole-nevole ni respondecas pri tio, kion ni sentas, pensas kaj faras... kaj foje eĉ pri tio, kio okazas al ni! Por ke paciento respondecu pri sia vivo, gestaltisto ne demandas al li aŭ ŝi, *kial* li faras ion, sed *kiucele* li faras tion.

Ekzemple, se paciento bedaŭras, ke li (aŭ ŝi) ebriiĝas ĉiun semajno-finon, terapiisto, anstataŭ konjekti pri la motivoj, pro kiuj li mal-sobras, povas demandi:

«Kion vi volas atingi ebriigante vin semajnon post semajno?»

Kongrua kun tiu emo al respondeco de la paciento, estas la rolo de la terapiisto. Li (aŭ ŝi) neniel estas kvazaŭdia aŭtoritatulo, kiu eldiras la Veron pri tio, kio okazas al la paciento:

«Vi ebriiĝas semajnofine, ĉar vi nesufiĉe mamsuĉis de via patrino, kiam vi estis bebo.»

Sed li estas nur kunulo, kiu klopodas speguli kiel eble plej honeste kaj objekte al la paciento tion, kion li ne kapablas vidi pri si mem:

«Kiam vi ĵus parolis pri via ebriemo dum semajnofinoj, vi alprenis sintenon, kiu ŝajnis al mi ĉagrena; ĉu ĉi tio diras ion al vi?»

Kompreneble, foje gestaltisto povas interpreti, sed tiam li (aŭ ŝi) nepre sciigas al la paciento, ke li interpretas, kaj ke lia interpreto estas simpla opinio de egalulo, kiun la paciento rajtas malakcepti, se li sentas ke ĝi ne kongruas kun propra sperto.

Jam pasis tri jaroj, de kiam mi komencis terapii. Mi sumigis cent okdek horojn pli-malpli. Mi kredas, ke mi ne plu bezonas terapion. Se mi rigardas malantaŭen en mia vivo, mi vidas, ke mi multe ŝanĝiĝis, feliĉe.

Kompreneble mi plu spertas malagrablaĵojn kaj havas problemojn (tia estas la vivo!), sed, ĉar mi estas pli konscia pri mi mem, mi do



D-R-O FRITE PEARLS, EN GAJA ĜTOSO, POZAS POR LA LEGANTOJ DE "KULTURAJ KAJEROJ"

sentas min pli sekura, trankvila kaj kapabla, kiam ili ekestas. Tiu estas la kialo, pro kiu mi decidis ekviziti kurson por lerni gestalt-terapion, depost oktobro 2007. Mi pensas, ke ĉi tiu trijara trejniĝado helpas min kiel homon kaj ankaŭ en mia profesio kiel mezlernejan instruiston.

Por eblaj interesitoj mi finas dirante, ke gestalt-terapion kreis Fritz Perls (aŭ Pearls) kaj lia edzino Laura. Li komence trejniĝis kiel psikanalizisto kun Freud, sed post kelka tempo li ekŝiĝis de la psikanaliza skolo, ĉar lia aliro al psika malsano trapasis la limojn de la psikanalizaj teorioj de majstro Freud. Ĝuste samtempe, ĉar judo, li devis forlasi sian naskiĝlandon Germanio por iri al Sud-Afriko. Li definitive enradikiĝis en Usono depost 1946. Tie dum la kvindekaj jaroj li pretigis kune kun sia edzino Laura sian novan vojon psikoterapian, kiun ili baptis gestalt-psikoterapio.

Li elektis ĉi tiun nomon, ĉar li parte inspiriĝis por siaj teorioj el psikologio pri gestalto. Ĉi lasta (ankaŭ nomata psikologio pri formo) estis movado de psikologio naskita en Germanio komence de la XX^a jarcento, kiu studis la manieron kiel homa menso perceptas realon. Kvankam la nomoj ŝajnas similaj, oni atentu, tamen, por ne konfuzi ambaŭ : unu afero estas psikologio pri gestalto, kaj afero tute alia estas gestalt-psikoterapio.


Ĉiel ajn, dum la sesdekaj jaroj, Perls kaj lia edzino disiĝis (ankaŭ pri teorio), kaj Perls iris al Kalifornio, kie tiam svarmis hipia kulturo, kaj kreiĝis tiu nova psikologio kiu poste nomiĝis humanisma psikologio. Ja en tiu periodo gestalt-terapio diskoniĝis, kaj Fritz Perls populariĝis.

Difino ekster PIV :

Gestalto : psikologia teorio pri sensado de formoj.

Kiel nomiĝu Grésillon ?

Verkis
Christian Rivière.



LA KASTELO Grésillon fariĝis Esperanto-centro preskaŭ kvardek jarojn post la morto de Ludoviko Zamenhof. Do ne eblas scii kiel li nomus ĝin en Esperanto, des pli ke la finaĵo « illon » en la franca retroviĝas sub diversaj formoj en Esperanto.

Nu, eĉ se la fonetiko de la vorto en la originala lingvo influas iom pli kaze de propra nomo, la radiko estu zorge elektita tra diversaj kriterioj, foje kontraŭdiraj ; la fiksita formo povas esti iom libera.

Konflikta tri parametroj en tiu specifa problemo :

- fakto, ke propra nomo de loko iasence estas malplej internacia ĉar ligita al specifa lando kaj loka lingvo ;
- garantio de eleganteco kaj de la fonetiko kaj de la ortografio ;
- konstato, ke ĝenerala sinteno antaŭ tiu problemo en diversaj lingvoj estas plej ĥaosa : Pékin (Bejing), Cologne (Köln), Risjel (Lille)...

Krom konservi la franclingvan nomon Grésillon, kiuj formoj eblas ? Larĝigante nian esploron, tra la franclingva vortaro, de la finaĵo « illon » al la pli komuna « ill » (ĉefe en la kvara formo ĉi-poste), ni povas konsideri kvin formojn : « l », « li », « lj », « jl » kaj « j ».

- 1.- Grezilono, same kiel pavilono^z, modilono, grilo*, koĉenilo*, vanilo*.
- 2.- Greziliono, same kiel papilio*, miliono*, felietono, medaliono*, bataliono.
- 3.- Greziljono, same kiel vermiljono, buljono*, kotiljono, postiljono, kariljono, Rusiljono, Marseljezo^z.
- 4.- Greziljono, same kiel pajlo*, sojlo*, brajlo, emajlo*, kanajlo*, Marsejlo, Versajlo.
- 5.- Greziljono, same kiel kojono.

(Estas interese noti, ke la du vortoj Marsejlo kaj Marseljezo, kvankam de la sama deveno, funkcias malsame. Cetere neniu el ambaŭ respektas la francan fonetikon!)


Ni facile konstatas, ke la kvar unuaj formoj estas instinkte preferataj, dum la kvina renkonteblas nur en kruda neologismo, kvazaŭ eŭfonio estigus necesa la literon *l*. Ne estas mirige, ke la tria formo Greziljono delonge trudiĝis tradicia. Ĝi estas la plej bona kompromiso inter plaĉo al la orelo, plaĉo al la okulo, kaj ĝi sonas sufiĉe proksima al la franclingva prononco.

Cetere, estas pli valorige kuŝi en kategorio kiu gastigas la vortojn vermiljono, kotiljono, kariljono, Rusiljono, ol kunkuŝi samkategorie kun kojono.

* El la Fundamento.

Kiel nomiĝu Grésillon?

Verkis
Andreo Andrio.



Loko kia Grésillon, kie ofte renkontiĝas homoj el diversaj landoj por praktiki Esperanton, devas ricevi nomon, kiu estu same prononcebla de ĉiuj esperantistoj. La franca formo Grésillon ne estas tia.

La esperantigita nomo ne devas esti arbitra; ne tiaj estas la radikoj de la komuna lingvo; ili estis elektitaj de Zamenhof por esti laŭeble internaciaj, do spontane rekoneblaj de kiel eble plej multe da homoj; la esperantigo de propra nomo devas esti facile rekonebla en skribo kaj parolo.

Ekzemple, se staĝonto, ĉu prononcante la esperantigitan nomon, ĉu montrante ĝin skribitan, petas de franco la vojon por atingi la kastelon, la franco devas en ambaŭ okazoj sufiĉe rapide kompreni, ke temas pri Grésillon.

Por eltrovi la formon de propra nomo, kiu aspektu kiel Esperanta nomo, kaj tamen estu rekonebla, mi ekzamenas la radikojn de Esperantaj vortoj, kiuj devenas de francaj vortoj similaj al la esperantigota nomo, ĉi tie Grésillon.

La unua parto de la vorto «Grés» ne starigas problemon, ĝi tute simple fariĝos «Grez». La dua parto, «illon», ne havas evidentan

esperantigon, ĉar tiu grupo de literoj respondas al diversaj Esperantaj literoj en la vortoj devenantaj de franca fonto.

Ni konsideru la diversajn kategoriojn de Esperantaj vortoj, kiuj respondas al franclingvaj vortoj entenantaj, post konsonanto, la litergrupon « *ill* » prononcatan « *ij* », kia estas Grésillon.

En la unua kategorio ni trovas nomojn, en kiuj « *ill* » fariĝas « *il* » en la Esperanta vorto, ekzemple grilo (*grillon*), gorilo (*gorille*), kilo (*quille, de bateau*), pavilono (*pavillon*), vanilo (*vanille*) kaj Antiloj (*Antilles*). Laŭ tiuj modeloj, la Esperanta formo estus « Grezilo » aŭ « Grezilono ».

En dua kategorio, « *ill* » fariĝas « *ili* » en la Esperanta vorto, ekzemple papilio (*papillon*). Laŭ tiu modelo la esperantigo estus « Grezilio » aŭ « Greziliono ».

En tria kategorio, « *ill* » fariĝas « *ilj* », ekzemple kariljono (*carillon*), kotiljono (*cotillon*), postiljono (*postillon*), vermiljono (*vermillon*) kaj Rusiljono (*Roussillon*). Laŭ tiuj modeloj la esperantigo estus « Greziljono ».

En kvara kategorio troviĝas en PIV almenaŭ unu komuna nomo, en kiu « *ill* », lokita post konsonanto kaj prononcata « *ij* » en la franca vorto, respondas al la literoj « *ij* » en la Esperanta vorto; ĝi estas rijeto (*rillette*). Troviĝas ankaŭ en PIV almenaŭ unu propra nomo esperantigita laŭ la sama modelo, koincide « Greziljono ».

Nun ni devas decidi, kiu el tiuj ses diversaj esperantigoj estas plej facile rekonebla, en skribo kaj parolo.

Scienca traktado de tiu problemo postulus enketon en la stratoj de Anĝero (Angers), de Baŭĝeo (Baugé) aŭ de alia loko en la ĉirkaŭaĵo; oni montrus al multaj homoj unu el la ĉi-supraj esperantigoj, aŭ elparolus unu el ili, kaj oni nombrus la fojojn, kiam la pridemandato komprenas, ke temas pri Grésillon, kaj la fojojn, kiam ĝi ne komprenas, por ĉiu proponita esperantigo.

Mi vetas, ke « Greziljono » atingus la plej grandan poentaron; tiu verŝajne estus nur egala al tiu de « Greziljono » pri la parola rekonebleco, sed superus ĝin pri la skriba; ĝi eble ankaŭ estus nur egala al tiu de « Greziliono » pri la skriba rekonebleco, sed superus ĝin pri la parola.

La ĉi-supra analizo konvinkas min, ke la plej bona esperantigo de la franca loko Grésillon estas Greziljono.

La Du Feinoj de Grésillon

Verkis
Emilio Perez Gimeno.

TIAM, mia Esperanto estis simpla, naiva kaj idealisma. Eble pro tio mem, ekde la unua fojo, kiam mi legis anonceton sur *Heroldo*, Grésillon havis por mi la allogon de ekzotika loko, la altiron de alilanda tre malproksima toponimio.

Do, iaman someran matenon post longa veturado en longaj kaj gravaj trajnoj, ĉarma lokomotiva trajneto finigis mian fervojan itineron en Baugé. Plia duonhora promenado kondukis min al ombrumita kampara vojo, kaj mia rigardo atingis la kastelon, kiu



Emilio loĝas en Zaragozo, en Aragono. Li verkis ĉi tiun rakonton dum sia restado en la kastelo aŭguste 2008.

aperis envolvita inter densfoliaj arboj, kelkaj blankaj nuboj kaj belblua ĉielo. Antaŭ la kastela fasado apud ŝtona ŝtuparo, restis senĉevala senpompa veturilo.

Tagmanĝo kaj vespermanĝo ĉirkaŭ ortangula tablo en amika rondeto evidentigis mian bonan apetiton sed ne mian bonan prononcadon.

Kiam la steloj ekbrilis kaj mia lito lulis min, mi falis en profundan dormon. Dum tiu unua nokto, ĉu sonĝe, ĉu reale, mi aŭdis krikrii la grilojn, ululi la strigon kaj kukui la uzurpuleton de najbara bird-nesto. Ankaŭ, de tempo al tempo, mi sentis misterajn paŝojn sur la ligna ŝtuparo, ridetojn kaj susurojn tra la koridoro, kaj mi eĉ kuraĝus certigi, ke blanka ĉevalo trenanta kaleŝon sin detenis antaŭ la ŝtona ŝtuparo.

Poste la nokto nigriĝis kaj mia sonĝo freneziĝis. Pluvo karesis la foliaron, la du literoj *l* de Grésillon ekflugis kiel birdetoj kaj iom post iom transformiĝis en mirindajn feinojn, kiuj puŝis la pluvajn nubojn ĝis mia seka lando.

Kiam la sonorilo vekis min, mi dubis, ĉu mi estas en feina lando, ĉu mi estas vere en Grésillon. Tiam mi konsciis, ke en *lluvia** kaj Grésillon estas du literoj *l*. Eble pro tio ambaŭ vortoj ŝajnas al mi magiaj.

* *Lluvia* : pluvo, en la kastilia lingvo.

Hajkoj

Verkis Greziljonaj staĝanoj
en kurso de Jean-Luc Kristos
julie 2008.

E_N mia ĝarden'
Antaŭ la sunleviĝo
Rozon kisas ros'.

Rolande.

La kapreolo bruas,
La birdoj kantas,
La somero feliĉas.

Malsata lacert',
Verda lokusto
Lasas subteran vivon.

Bernard.

Suno ekbrilas,
Multaj birdoj ekkantas,
Bela somero.

Nokto agrabla,
Kun granda amikeco,
Verda kamparo.

Francisca.

Verema Véronique.

L

Verku la Kulturajn Kajerojn

Kial vi ?

Ĉar en niajn paĝojn

Ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,
sed homoj kun homoj.

Pri kio ?

Por la parto « Historio de kulturdomoj » :

Studu la (eĉ proksiman) pasintcon de via preferata kulturejo ;
Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj ;
Ne provu priskribi ĉion : elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado » :

Klerigu nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriĝado » :

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita.
Aŭ partoprenu nian anoncotan ludon.

Sed ne pri kio ?

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri :
politiko ; religio ; ekonomio ; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj :

jam konataj tekstoj ; (plejofte) tradukaĵoj ; (nepre) krudaĵoj.

Kiel ?

Ĉe ni « verki » signifas : skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr ».